# Va Internacia Esperantista Kongreso Barcelono

**5-11 septembro 1909**

Kara samideano:

Kiam ni eldonis la kvaran cirkuleron, ni kredis, ke ĝi estis la lasta, kiun ni estis devigataj fari por instrui la samideanojn pri la kongresaj aferoj. Bedaŭrinde, la lastaj okazintaĵoj de nia urbo devigas nin ĝeni ankoraŭ unu fojon la atenton de ĉiu per niaj skribaĵoj.

Ni povas laŭte diri, ke la eksterlanda gazetaro tiel trograndigis la faktojn en Barcelono okazintajn, ke ofte, legante ĝin, la rido aperus sur niaj lipoj se ni ne pensus, ke tiuj trograndigoj kaj mensogoj malfeliĉe timigis multajn samideanojn, kiuj kompreneble, kiam ili fariĝis Esperantistoj faris ĉiun promeson eblan, ekcepte la promeson travivi gravan danĝeron. Kredante ke la Barcelonaj okazintaĵoj povus decidigi kelkajn samideanojn ne ĉeesti la Kongreson pro la dubebleco de ĝia sukceso, la Organiza Komitato prenis la decidon sin turni rekte al ĉiu Kongresano por sciigi lin pri la jenaj faktoj:

1a Konsiderante ke la Barcelonaj okazintaĵoj povus iom malhelpi la sukceson de la Kvina, la Organiza Komitato speciale komisiis la vicprezidanton S-ron. Sabadell por ke li iru Madrid'on persone paroli kun la Ministro de la Enlandaj Aferoj pri la situacio farita al Kongresaj laboroj de la nunaj okazintaĵoj.

2a La vicprezidanto de la Komitato alportis el Madrido plej bonajn impresojn kaj la inviton daŭrigi pli fervore ankoraŭ niajn preparajn laborojn, certigante al ĉiu samideano, ke la trankvileco reganta en nia urbo estas favora kaj certa antaŭsigno de la Kongreso efektivebleco.

3a Ĉar la timo povis kapti, laŭ oni diris al ni, kelkajn kongresontojn, ni kredas ke estas devo de ĉiu esperantisto korekti per ĉiuj eblaj rimedoj la malverajn informojn donitajn de la gazetoj, presigante en la ĵurnaloj de iliaj respektivaj urboj, ke «ĉial» la Kongreso okazos, kaj ke ĝia sukceso estas tiel certa kiel antaŭe. Ni eĉ ne volas pritrakti la demandon al ni faritan, pri la «persona sekureco» de la eksterlandanoj; la ĝentileco kaj gastameco de Barcelono, neniam neitaj, malpermesas al ni paroli pri tiu temo.

Ni turnas nin al vi, do, kara samideano, kiu jam estas enskribita en la listo de Kongresanoj aŭ kiu havis intencon tion fari. Ni, kiuj travivis tiun semajnon kies faktoj false raportitaj povis dum momento vin ŝanceligi, ni, kiuj prenas sur nin la respondecon fari la Kongreson ĉi tie, neniam pensis ke ĝi povas ne okazi, aŭ ne okazi en Barcelono. Ĉio estas preta por vi ĉi tie, ĉio estas preparita por akcepti tiujn gastojn tiel varme kaj sincere atenditajn de la Reĝino de l'Mezamaro. Nia ĉielo repaciĝis kaj nun, kiel antaŭe, de via ĉeesto en Barcelono dependas la sukceso de la Kongreso kaj de la ideo, kiun ĝi reprezentas.

La Loka Organiza Komitato.

Barcelono la 10an Aŭgusto 1909.

# En Barcelonon kaj Valencion

Granda estas la entuziasmo, kiu animas ĉiujn hispanajn Esperantistojn por

# A Barcelona y Valencia

Grande es el entusiasmo que anima á todos los esperantistas españoles por re-